

Kial la Eŭropa Unio ne povas oficiale havi komunan lingvon?

Aperis en EŬROPA UNIO, LINGVAJ KAJ KULTURAJ ASPEKTOJ. Referaĵoj kaj diskutintervenoj (Red. Senad Ĉolić), Sarajevo, elbih, 2011. p. 134-158.

Enkonduko

En ĉi tiu studo temos pri plurjardeka, sed esence fiaskinta, klopodo de eŭropaj esperantistaj agantoj por la oficiala akceptigo de Esperanto ĉe la institucioj de la Eŭropa Unio. La fiasko devenis el ne konvena informiĝo kaj la supraĵa kono aŭ neglekto de la koneksaj preskriboj de la Traktato pri la Eŭropa Unio. La instruaĵo el la fiasko estas, ke la agon por Esperanto oni devus direkti tien, kie la radiko de la sukceso plejparte troveblas.

Antaŭ ol komenci la eksplikon de la fakta temo mi devas memori vin pri kelkaj karakterizaĵoj de la eŭropa integriĝo. Du ĉefaj karakterizaĵoj de la integriĝa procezo estas: la plivastigo de la Eŭropa Komunumo/Unio en pluraj etapoj, kaj la interna disvolvo de la integriĝo.

La faktoj de la komenco kaj la plivastigo estas la sekvaj.

En aprilo 1951 ses landoj: Francio, (Okcident-)Germanio, Belgio, Nederlando, Luksemburgio kaj Italio subskribis la Traktaton pri la Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo (Montanunio), kiu validiĝis en julio 1952 (kaj malvalidiĝis en 2002). Tiuj samaj ses landoj en marto 1957 en Romo subskribis la Traktaton pri la estigo de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (Komuna Merkato), kiu validiĝis la 1-an de januaro 1958. (En Romo la registaroj de tiuj landoj subskribis ankaŭ la traktaton pri la Eŭropa Atom-Energia Komunumo /Euratomo/).

La etapoj de la plivastigo:

1973: Britio, Irlando kaj Danio.

1980: Grekio.

1985: Hispanio kaj Portugalio.

(1993. Komenco de la Eŭropa Unio)

1995: Aŭstrio, Finnlando kaj Svedio.

2004: Ĉeĥio, Estonio, Hungario, Kipro, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Slovakio kaj Slovenio.

2007: Bulgario kaj Rumanio.

La eŭropa integriĝo estas procezo, en kiu pluraj ŝtatekonomioj kunligiĝas, la diferencoj inter ili iom post iom malaperas, la rilatoj inter ili iom por iom similiĝas al ecoj de unusola ŝtatekonomio, krom tio okazas ankaŭ politika interproksimiĝo. Por la estigo de la Komuna Merkato oni devis laŭgrade estigi komunajn komercan kaj agraran politikojn, jure reguli unuecajn konkurkondiĉojn, interproksimigi impostsystemojn, harmonigi la naciajn jurajn systemojn, certigi liberan movon por la laborforto, forigi la internajn doganojn kaj aliajn barojn. La laŭgrada efektivigo de tiaj taskoj estas la esenco de la interna disvolvo (aŭ la profundigo de la

integriĝo). Dum kvar jardekoj la Eŭropa(j) Komunumo(j) estis nur ekonomia integriĝo.

La Roma Traktato dum la integriĝa procezo ricevis modifojn konforme al la atingaj kaj la pli novaj celoj. (Unuiga Traktato 1965/67, Unueca Eŭropa Dokumento 1986/87, Mastrohita Traktato 1992/93, Amsterdama Traktato 1997/99, Nica Traktato 2001/03, Lisbona Traktato 2007/09. (Rimarko pri la ciferoj: subskribo/ekvalido).

Paralele kun la ekonomia integriĝo en 1986 komencis ankaŭ politika kunlaboro, kiu poste ricevis pli konkretan formon en la Mastrohita Traktato pri la estigo de la Eŭropa Unio.

Por doni respondon al la demando donita en la titolo, oni devas prezenti bildon pri procezo, en kiu esperantistaj rolantoj agadis por la akceptigo de Esperanto ĉe la institucioj de la Eŭropa Unio (EU). Ekde 1995 mi kunlaboris kun pluraj el tiuj rolantoj, sed kun alia celo: en Hungario, kiu tiutempe ankoraŭ ne estis ano de EU, alvoki la atenton al la „eŭropa lingva problemo”. Do mi estis kvazaŭ peranto de informoj, kiujn mi ricevis de la kunlaborantaj esperantistoj, ĉefe el Belgio.

Tiu rekono, kiun ĉi tiu artikolo fine prezentos, aperis ĉe mi post pli ol dekjara agado, rezulte de analizo de EU-instituciaj manifestiĝoj por mi (sed ne nur mi) nekompreneblaj pli frue.

Teoriaj kaj praktikaj pensoj pri la eŭropa lingva problemo

Post kiam la membroŝtatoj, estigintaj la Eŭropan Ekonomian Komunumon, decidis pri la oficialaj lingvoj kaj ties samrajteco, la demando de la lingvouzo tuŝis nur tre malmultajn homojn kompare al la tuta loĝantaro. Kiuj homoj, kun malsamaj lingvoj, devis komuniki unu kun la alia(j), tiuj homoj aŭ estis rajtigitaj je uzo de interpretistoj, aŭ estis oficistoj, spertuloj k.s. kun lingvosciaj devoj. Esence tia bildo karakterizis la solvon de la lingvouzo koncerne la internacian komunikadon dum la nura ekonomia integriĝo. Dum tiu tempo la nombro de la membroŝtatoj altiĝis de ses al dek du, la nombro de la oficialaj lingvoj altiĝis de kvar al naŭ. Sekve de tio la tradukdirektoj altiĝis de 12 al 72 kaj la kostoj de la interpretado altiĝis proporcie al tio, kaj kreskis ankaŭ la streĉiteco inter la ideo aŭ postulo pri la samrajteco kaj la praktika vidpunkto pri la ekonomia (kaj ankaŭ la efikeca) solvo.

Ĉirkaŭ ekde 1985-86, kiam por la publiko iĝis konata la intenco de la Komunumo pri la paŝoj al la politika integriĝo kaj pri nova plivastigo, en la pensado pri lingvaj demandoj akriĝis la dilemo, kaj ankaŭ nova elemento aperis: Kiel solvi la komunikadon inter la loĝantoj de EK? Ja, se integriĝo signifas proksimiĝon al iaspeca unueca eŭropa formacio, tiam bezonos ankaŭ komuna(j) lingvo(j) krom la lingvoj de la membroŝtatoj. Pro ĉio ĉi en la publika konscio nove kaj denove aperis demandoj (kaj proponoj) pri la eblaj „solvoj” de la lingvouzo ĉe la EU-institucioj kaj por la civitanoj en EU. En tio aperis ankaŭ timo pro la pli vasta rolo de la angla.

Kompreneble inter la unuaj serĉantoj de solvoj estis ankaŭ esperantistoj. Ekzemple unu el la proponoj: „Sabato la 13-an de oktobro, en tri landoj de [la] Eŭropa Komunumo okazis esperantistaj manifestacioj. En Dublino, Irlando, antaŭ

la irlanda oficejo de la Eŭropa Parlamento, sep homoj – plejparte verduloj – petis atenton al la problemo de *komuna, dua eŭropa lingvo.*” (*Esperanto*, januaro 1991, p.6. Emfazite de L. G.) Sed la oficiala starpunkto de la EK-institucioj estis kaj restis la **mult-** kaj **plurlingveco**. En la nocio **multlingveco** esprimiĝas la eŭropa lingva diverseco kaj la egalrajteco de la oficialaj lingvoj. La **plurlingveco** rilatas al personoj kun la principa postulo scii almenaŭ du-tri fremdajn lingvojn. Rimarkinde, ke la mult- kaj plurlingvecon favoras ankaŭ la Konsilio de Eŭropo, kiu estas la plej malnova kaj plej ampleksa politika organizo de la kontinento, kaj kiu nun inkludas 47 eŭropajn ŝtatojn.

Penadoj en la Eŭropa Unio por la oficiala akceptigo de Esperanto

Kiu alproprigis kaj uzas la Internacian Lingvon, tiu konas ĝian favorajn ecojn el propra sperto. Pro tio estas natura fenomeno, ke tiaj personoj, nome esperantistoj, bonkore proponas tiun lingvon al aliaj personoj, ĉar por ili ĝenerale estas memkomprenebla afero, ke Esperanto estus utila por ĉiu. Sed tiu memkomprenebleco malhelpas ilin en la klarvido konsidere la cirkonstancojn kaj malfacilaĵojn. La reala vido de la cirkonstancoj kaj baroj povas helpi nin en la trovo de pli racia agado. Pro tio estas lerniga la studo de mondhistoriaj epizodoj. Tiaj estas la penadoj por la akceptigo de Esperanto en la Eŭropa Unio.

Komenci la tiacelan skizan trarigardon estas utila citi el artikolo de Grégoire Maertens (Momento, kiu eble neniam revenos, *Esperanto*, julio-aŭgusto 1991, p. 135.) Li ĉefe parolis pri la broŝuro *Komunikado en Eŭropa Komunumo*, kiu aperis en 1989.

”»Komunikado en Eŭropa Komunumo« estas politika kampanjo, kiun iniciatis Hans Erasmus, nederlanda ŝtatoficisto kiu nuntempe gvidas naturmediajn programojn de la Eŭropa Komisiono en Bruselo. La projekto celas analizi la lingvoproblemon kadre de la Komunumo, inkluzive de ekonomiaj, politikaj kaj kulturaj aspektoj. Se la Komunumo efektive volas solvi tiun problemon, ĝi devos serioze konsideri la eventualan rolon de Esperanto: tio estas la baza premiso de Erasmus kaj liaj kuniniciatintoj.

”Unu el la 10 agaderoj de la projekto celas prezenti la problemaron al Eŭropa Parlamento kaj Konsilio de Eŭropo. Tiu ĉi lasta instanco ampleksas pli da ŝtatoj, ol nur la 12 de EK, per kio ni celas atentigi ke la problemo de komunikado ne limiĝas al la EK-landoj. En la Parlamento ni celas rezolucion, en kiu oni petos la Eŭropan Komisionon ĝisfunde studi la problemaron kaj eble aldonos kelkajn proponojn pri ĝia solvo aŭ mildigo.

”Tiucele estus eble apliki proceduron, kiun oni lastatempe evoluigis por la mediopolitiko de EK. Agadgrupo, konsistanta el reprezentantoj de ĉiuj sekcioj de EK, ellaboras strategion per kvinfaza laborprogramo en du-tri jaroj. Unue oni priskribas la nunan situacion, poste analizas ĝin, tiam identigas eblajn solvojn kaj kreas strategion, kiun oni fine konkretigas en plenumplano aprobenda de la EK-organoj. Ĉiun fazon oni kompletigas per dokumento en la naŭ oficialaj lingvoj de EK plus kelkaj aliaj, por vasta publikigo. Samtempe devas kreiĝi granda reto de interesitoj, kiuj provizas la projekton per reagoj, ideoj kaj kritikoj.

”Alia agadero, por pli-malpli samtempa efektivigo en ĉiu ŝtato, koncernas la okazigon de kongresoj, simpozioj k.s. en kiuj oni diskutas ĉiujn aspektojn

de la komunikado en EK. Argumentoj por kaj kontraŭ la diversaj solvoj, ekzemple la pli efika instruado de fremdaj lingvoj aŭ la pli ofta uzado de Esperanto aŭ aliaj lingvoj, devas esti elprovitaj kaj profundigataj en tiaj aranĝoj.”

La priskribo de la projekto, kiun oni nun tradukas en ĉiujn eblajn eŭropajn lingvojn, inkluzivas ankaŭ diversajn informojn kaj opiniojn pri la lingvoproblemo. Interalie la aŭtoroj (Erasmus, ILEI-prezidanto Edward Symoens, UEA-estrarano Grégoire Maertens, kaj oficisto ĉe Eŭropa Komisiono Michael Cwik) substrekas la neceson strebi al socia interkonsento pri la elektota agadlinio. Nek la pli vasta uzo de la angla, nek de iu alia nacia lingvo, donas bazon por tia konsento; sed ankaŭ Esperanton oni ne povas haste aŭ desupre trudi al eŭropaj popoloj. La proceduro por difini novan lingvopolitikon, same kiel tiu lingvopolitiko mem, devas esti akceptebla por ĉiuj.”

Ĉi tiu artikolo donas al ni kelkajn bazajn informojn pri agadceloj kaj agadplanoj koncerne la lingvan problemon en la Eŭropa Unio; pri la iniciatintoj de projekto, kiu havis ne malgrandajn celojn. La grupon de la menciitaj personoj oni nomis brusela laborgrupo aŭ kerna laborgrupo de la laborgrupo pri la lingva problemo en la Eŭropa Unio. Nome, por helpi la efektivigon de la agadcelojn, al la tuta laborgrupo krom la brusela laborgrupo apartenis ankaŭ landaj Esperanto-Asocioj kaj individuaj personoj. Hans Erasmus kaj Michael Cwik havis certajn spertojn pri la funkciado de EK-institucioj kaj pri la orientiĝo de la EK-oficistoj. Tamen la entrepreno tute ne estis facila afero. Tri jarojn post la apero de la citita artikolo aperis artikolo ankaŭ de Hans Erasmus (Nek disvastigi nek solvi, sed..., *Esperanto* junio 1994. p. 104-105.). Jen kelkaj partetoj el ĝi.

„La agadplano emfazas ke unue kaj principe taskendas la ekkonsciigado de la lingva problemo en EU. Sekve oni atentigu pri la rolo kiun la planlingvo povos plenumi por efektiva solvo de la lingva problemo.”

„La 29-an de septembro 1993 ĉe la Eŭropa Parlamento en Bruselo la laborgrupo okazigis kun la Fondaĵo Hanns Seidel kaj la Eŭropa Parlamento seminarion pri la lingva problemo en EU. Rimarkinda sperto de la seminario estis la konsterna manko de bazaj scioj pri planlingvoj ĉe la partoprenantaj politikistoj kaj oficistoj eŭropaj.”

„(...), la E-movado devas tamen daŭre alfronti duran realon: *la (makro)socio troviĝas ankoraŭ nur en la fazo de ekkonsciigado pri la lingva problemo*. Tial la tuja propono utiligi aŭ eĉ oficialigi Esperanton tute ne estas memkomprenebla, nek digestebla. En renkontiĝoj kaj interparoloj ni ne senprezare ĵetu nian solvon sur la tablon, ekparolante pri rimedo por problemo kies ekzisto kaj solvindeco eble tute ne klaras al la ĉeestantoj. Unue firme konvinkiĝu ke ili efektive konscias la lingvan problemon kaj sufiĉe komprenas ĝiajn facetojn kaj implicojn. Unue la analizo, poste la rimedo.”

Post kiam pasis multaj jaroj oni povas esti pli saĝa, vidi aferojn pli klare, kaj demandi pri la vera senco de kelkaj vortoj. Kio vere estas ‘lingva problemo’ (en EU)? En la unua alproksimigo ‘lingva problemo’ rilatas al bezono de la lingvouzo en la (eŭropa) internacia komunikado kaj al ties lingvo. Per demandaj vortoj: en

kiaj kazoj kaj cirkonstancoj oni devas kaj povas uzi fremdan lingvon kaj kiun lingvon? Kiaj konsekvencojn, favorajn kaj malfavorajn, kaŭzas la uzo de iu aŭ alia elektita lingvo? Al ĉi tiu demando rilatas la vorto 'problemo'. Laŭ PIV la 'problemo': „2 Ĉio, kion klarigi aŭ solvi estas malfacile“. Sekve, la lingva demando signifas solvendan malfacilaĵon, kiun kaŭzas la internacia uzo de iu aŭ alia lingvo. Tiajn malfacilaĵojn oni povas prezenti per logika konkludo kaj per kolekto de faktoj kaj okazintaĵoj. En la agado de la brusela laborgrupo plejparte la logika konkludo ludis rolon. Do laŭ la strategio de la laborgrupo la unua paŝo estis konigi la malfavorajn sekvaĵojn de ia aŭ alia lingvouzo, kaj se la celitaj personoj (kaj instancoj) komprenis kaj agnoskis ilin, nur tiakaze proponi pli taŭgan solvon (nome Esperanton). Sed mankis la ekzameno de tiu demando: de kio dependas, ke oni trovas aŭ ne trovas la malfacilaĵojn solvendaj, eĉ ankaŭ la agnoskitajn? La decidon pri tio influas, eĉ kontraŭ la logiko, interplektiĝo de ne malmultaj aliaj interesoj, kutimoj, nescio, seninteresececo, superstiĉo k.s. La ĉiutaga praktiko montras, ke tia influo povas esti tre-tre forta. La strategio ne parolis pri tio, kiel fronti kaj superi la rifuzon fare de la celitoj. Hans Erasmus daŭre proponis singardon al esperantistoj. Sed la singardo tute ne povas influi la rifuzon, nome la ne akcepton de tio, ke la lingvouzaj malfacilaĵoj estus solvendaj. Pri la seminario, kiun supre menciis Hans Erasmus, iom detale raportis István Ertl en la revuo *Esperanto* (oktobro 1993. p.161.) Kelkaj fragmentoj el ĝi.

„Enkonduke la prezidanto de la Eŭropa Parlamento, Egon Klepsch, emfazis ke la lingvan politikon de EK difinas la principoj de lingva egalrajteco kaj kultura plureco. Formulante lingvopolitikajn proponojn, ekspertoj ne kontestu tiujn principojn. (...)

(...) Ingo Friedrich, (...), salutis la ĉ. 100 ĉeestantojn. Inter ili eblis distingi precipe esperantistojn (c. kvardekon), sed ankaŭ anojn de la lingvaj servoj, kaj kelkajn politikistojn aktivajn aŭ emeritajn.

En la matena programo politikistoj kaj EK-dungitoj esprimis siajn spertojn kaj starpunktojn. Eŭropa deputitino Marianne Thyssen (Nederlando) opiniis: oficiala ŝanĝo en la lingvouzo eblus nur post unuanima konsento de la Konsilio de Ministroj, sed oni ne sentos bezonon reformi la nunan lingvan reĝimon ĝis la lingvonombro estos signife kreskinta.”

„En la tag-ferma rondatabla diskuto pri "Ĉu du fremdajn lingvojn por ĉiu: unu planitan kaj unu naciajn?" aŭdiĝis poroj kaj kontraŭoj pri tiu koncepto. Sed la fakuloj konsentis pri unu afero: ili proponis starigi laborgrupon pri la komunika kaj lingva problemoj, kaj invitis la Eŭropan Parlamenton ke ĝi mandatu la Komisionon prepari kaj organizi tian laborgrupon. Baldaŭ akireblos la dokumentoj de la konferenco, kaj jam estas planata pli longa seminario pri simila temo venontjare.”

Sed tia seminario restis nur planita. Ĉi tie estas nek celo, nek eblo pli detale konigi la agadon de la laborgrupo kaj ties rezulton. Kio karakterizis tamen la pluan agadon de la kernlaborgrupo? Jen konciza resumo pri tio:

- sukcesa kaj utila rilatestigo kun kelkaj politikistoj (ekz. kun EP-anoj, komisiono Emma Bonino), kun funkciuloj de la Konsilio de Eŭropo ktp.,
- ellaboro Laborplano 1995–2000 kaj ĝia propono al la Eŭropa Esperanto-Unio (kvankam ĝi ricevis malmultan atenton de EEU),

- ellaboro du projektoj (Neighbour, Relais) por lerneja kaj interpreta eksperimentoj,
- aperigo de tiuj projektoj en pluraj lingvoj kaj dissendo - simile al aliaj materialoj - al deputitoj de la Eŭropa Parlamento, plue al la Komisiono, Konsilio de Eŭropo, kelkaj fakuloj k.s.,
- partopreno en kelkaj sciencaj konferencoj,
- urĝigo, ke oni estigu universitatan katedron pri lingva problemo kaj planitaj lingvoj.

En la aktivado de la laborgrupo pri la eŭropa lingva demando la motoro estis la brusela laborgrupo kaj en ĝi Hans Erasmus. Estas fakto, ke la agado de la brusela laborgrupo atingis multe da politikistoj, fakuloj kaj institucioj, kiuj tiamaniere havis la eblon iomete informiĝi pri la supozata eŭropa lingva problemo kaj pri Esperanto. Tiasence la aktivado pruviĝis utila. Esence tiu aktivado rezultigis ankaŭ la t.n. Nitobe-simpoziojn. Tamen ankaŭ tio estas fakto, ke ne nur unu planoj, projektoj neniam realiĝis, spite al la fervoro de la brusela laborgrupo. Do la bazaj celoj de la laborgrupo estas neatingitaj.

Okazis ankaŭ alia agado sub la nomo de eŭropa lingva problemo. Pri tio jen citaĵo el la artikolo de la plej aŭtentika persono, Germain Pirlot.

Redaktora enkonduko: „Germain Pirlot enketas ekde marto 1995 pri la opinio de belgaj membroj de Eŭropa Parlamento (EP) rilate la eŭropan lingvoproblemon. Li raportas pri la evoluo de sia kampanjo.”

„Lerneja enkonduko de Esperanto dependos de politikistoj. Sekve ni regule, objektivite, sentrude informu ilin. Ĉar Esperanto estas supernacia helplingvo, ĉe la eŭroparlamentanoj ni klopodu akceptigi la ideon pri eventuala uzado de tia lingvo, por helpi solvi en Eŭropa Unio - ne nur sine de ties instancoj - la lingvan problemaron.

Pri ĉi tiu ideo mi petis letere la opinion de la 25 belgaj EP-membroj. Mi substrekis ke la celo estas diskonigi la opiniojn. Nur 4 el la 25 reagis. Tiujn respondojn mi resendis al ĉiuj, kaj venis 3 pliaj reagoj. Iom post iom entute 13 EP-anoj kuraĝis esprimi sin pli-malpli favore al esperanto, verŝajne ĉar ili konstatis ke ankaŭ kolegoj ne kontraŭas ties eventualan uzadon.

Nepras organizi similan enketon en ĉiuj EU-landoj. Intertempe 47 el la 626 EP-anoj (ĉ. 7%) - el Belgio, Britio, Francio, Irlando, Italio kaj Luksemburgio - esprimis pli-malplian subtenon al eventuala uzado de Esperanto por solvi la lingvan problemaron de EU. Verŝajne estas pliaj kiuj simpatias Esperanton; ni informu ilin!

Helpu vian landan kunordiganton, aŭ surprenu la kunordigan taskon en Aŭstrio, Finnlando, Germanio kaj Luksemburgio, kie tia kunlaboranto ankoraŭ mankas.” (*Esperanto* januaro 1996. p.11.)

Interesa bildo estas la formiĝo de la rezulto de la tia informagado dum kvarjara periodo. En la tabelo la ciferoj post la landnomo signifas nombron de EP-deputitoj de la lando, la postaj ciferoj signifas nombron de EP-deputitoj kiuj iomete favore reagis al la informo. (Laŭ la informoj de Germain Pirlot.)

Membroŝtato	EP-deput.	10. 1995	12. 1996	11. 1997	12. 1998	% 1998
Aŭstrio	21	-	1	2	3	14,3
Belgio	25	13	15	15	18	72,0

Britio	87	13	22	30	30	34, 5
Danio	16	-	1	1	1	6, 3
Finnlando	16	-	2	2	2	12, 5
Francio	87	3	10	11	13	14, 9
Germanio	99	-	3	8	10	10, 1
Grekio	25	-	-	-	-	0, 0
Hispanio	64	-	3	7	10	15, 6
Irlando	15	11	13	13	14	93, 3
Italio	87	1	18	20	19	21, 8
Luksemburgio	6	-	1	1	1	16, 7
Nederlando	31	-	-	2	2	6,5
Portugalio	25	-	1	2	4	16, 0
Svedio	22	-	4	4	4	18, 2
Sume (el 626)	626	41	75	118	131	20, 9

Estas nekonate, ke en la membroŝtatoj kia forta, konsekvenca ktp. estis la informo rilate la EP-deputitojn. Pro tio la tabelo povas prezenti nur tion, ke per sistema kaj taŭga informado oni povas influi homojn. Post nova baloto por la Eŭropa Parlamento la informadon oni devis fari de la komenco. Por kelkaj esperantistoj ne plaĉis la informagado kunordigita de Germain Pirlot.

Okazis ankaŭ aliaj aktivadoj. Ekzemple en 1996 dek du esperantistoj el dek landoj sendis malferman leteron kun tre bonaj argumentoj al la anoj de la Eŭropa Parlamento. Estis iniciatintoj ankaŭ la Radikala Partio kaj la „Esperanto” Radikala Asocio (ERA), kaj oni povus mencii pluajn ekzemplojn. La rezulto ĉiam estis la rifiŭza sinteno de la EU-institucioj.

Spertoj de informado en kandidatlando de Eŭropa Unio

Sub ĉi tiu titolo mi devas rakonti plejparte en unua persono, pro tio mi petas vian komprenon. Mi engaĝiĝis en 1995 en la informado pri eŭropaj lingvaj aferoj kaj pri Esperanto, kion la estraro de la Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) kontente akceptis kaj aprobis. Tiam la sekretario de HEA letere ligis min kun la brusela laborgrupo.

Tiutempe Hungario estis jam kandidatlando de la Eŭropa Unio. Koncerne la informagadon ni celis informi unuavice, sed ne nur, hungarajn politikistojn pri tiuj problemoj kaj eventoj, kiujn la laborgrupo kaj la revuo Esperanto aŭ Henri Masson koncerne la eŭropan lingvan problemon prezentis. Nia unua paŝo estis estigi informilon (kajeroserion) sub la titolo *Az Európai Unió és a nyelvi kérdés* (La Eŭropa Unio kaj la lingva demando). Tiu ĉi kajeroserio aperis ekde 1995 ĝis 2004 en la komuna redaktado de Oszkár Princz (tiam sekretario de HEA) kaj mi. La kajeron, kiu baldaŭ havis bonan akcepton ankaŭ de kelkaj politikistoj, dissendis la estraro de HEA.

Kiam mi spertis, ke por atingi vastan publikon ni ne havas taŭgan rimedon, mi verkis libron: *Az egyesülő Európában társalogjunk vagy dadogjunk?* (Ĉu en la unuiĝanta Eŭropo ni konversaciu aŭ balbutu?). Ĝi aperis en 1996 (helpe de mia familio) kaj baldaŭ gajnis bonan eĥon, ĉefe en esperantistaj rondoj. Sed la libro jam en la verka fazo kaj ankaŭ poste rezultigis por la aŭtoro interrilatojn kun renomaj fakuloj (historiistoj, lingvistoj), kiuj aprecis mian aktivadon en lingva afero kaj la penadon por Esperanto. Kun pluraj el ili formiĝis plur- aŭ multjara agrabla interrilato, en kiu ĉiam ĉeestas la informo pri Esperanto kaj ankaŭ ilia simpatio al ĝi.

En la unua parto de 1996 la hungara registaro devis respondi demandojn de la Eŭropa Komisiono. Estis do okazo por memori la registaron pri la lingva demando. Post nia sugesto esperantistoj per leteroj komencis bombadi la Ministerion pri Eksterej Aferoj. Komprenoble la respondoj estis ĝentilaj nenidiraj. En 1999–2000 en Hungario aperis pluraj libroj kaj artikoloj, en kiuj la aŭtoroj analizis la atendeblan lingvan estonton. Plimulto de la aŭtoroj timis la sekvaĵon de la troa disvatiĝo de la angla, sed ili ne vidis rimedon kontraŭ ĝi, eble nur la plurlingvecon, eĉ se por iu aŭtoro estis konataj ankaŭ la favoraj ecoj de Esperanto. Pro tio mi trovis bezona, ke en nova libro mi donu kritikon pri la oportunecaj starpunktoj. Fine de 2000 aperis (helpe de esperantistoj) tiu libro: *Egyenes beszéd – nyelvügyben* (Sincera parolo – pri lingva afero).

La verko de tiu libro donis bazon por mi verki esperantlingvan broŝuron *Ĉiu lingvo brilu samrajte!*, kiun aprobis eŭropa internacia laborgrupo, kaj kiun esperantistoj tradukis en plurajn naciajn lingvojn kaj aperigis ilin en 2001.

En decembro 2004, en konferenca prelego mi surprizate aŭdis de konata hungara lingvisto, ke kvankam li estimas la penadon de esperantistoj, sed oni nepre devas subteni la lernadon de la angla, kaj li esprimis sian tutan konsenton pri artikolo, kiu glorigis la simpligitan, t.n. „aerdoman anglan”. Mi konsideris kiel mian devon doni konvenan respondon, kiun mi faris per pli nova libro: *A sokféleség közös nyelve* (Komuna lingvo de la diverseco), kaj kiu aperis (denove helpe de esperantistoj) en 2005. Pluraj hungaraj lingvistoj gratulis min pro tiu libro.

Dum la tuŝitaj jaroj oni aperigas de mi plurajn artikolojn en revuoj kaj leterojn en gazetoj, krome mi kelkfoje havis eblon por publike prelegi pri la eŭropaj lingvaj demandoj.

La supre prezentitaj okazintaĵoj koncerne la lingvan problemon baziĝis sur pensmaniero simila al la kernlaborgrupo, sed nia informado direktiĝis unue al politikistoj, poste plie al intelektuloj kaj ankaŭ al la socia publiko. Oni povis

sperti, ke nur tre malvasta parto de la homoj estas sentema por lingvouzaj problemoj. Sed ankaŭ tio estas sperto, ke sistema kaj bone pripensita informado povas akiri simpatiantojn por Esperanto, eĉ se por ĝi ili nuntempe ne vidas bonan ŝancon.

Supre temis pri okazintaĵoj, kiuj rilatis iamaniere al la eŭropaj lingvaj problemoj. Nature en la sama tempo por Esperanto laboris pluraj esperanto-organizo kaj ne malmultaj esperantistoj en Hungario, sed pri tio ne estas tasko ĉi tie rakonti.

Kio kaŭzis la daŭran malsukceson?

La ĝis nun diritaj celis prezenti la grandan fortostreĉon de eŭropaj esperantistoj por ke Esperanto iĝu oficiale akceptita fare de la institucioj de la Eŭropa Unio. Faktoj montras la malsukceson de la penado por tiu celo. Pro kio estas la malsukceso? La esenco de la respondo estas simpla kaj mallonga: ***la kaŭzo de la malsukceso devenas el la traktato(j) de la eŭropa integriĝo.*** Pli detale temas pri la sekvaj faktoj. En ĉiu varianto de la Traktato koncerne la eŭropan integriĝon (pri EK aŭ EU) estas bazaj principaj postuloj unuflanke la egalrajteco de ĉiu membroŝtato kaj ties kulturo, inkluzive en ĝi tiun lingvon, kiu estas oficiala lingvo de la Eŭropa Unio; aliflanke estas baza principa postulo, ke la kulturo, instruado k.s. plene apartenas al membroŝtata agosfero.

Kvankam kiam en la integriĝo aperis la intenco pri la politika plivastigo oni racie povus esti pensinta, ke en EU aperos bezono ankaŭ je komuna lingvo. Tamen la principo de la egalrajteco ekskludas, ke oni oficiale deklaru aŭ aprobu tian bezonon. Ĝi ekskludas, ĉar la politikistoj tute ne povis konsideri aliajn lingvojn nur la naciajn. La akcepto de la ideo pri komuna lingvo signifus, ke oni superigus iu lingvon el la oficialaj lingvoj super la aliajn, kio estus kontraŭ la principa postulo de la samrajteco. Estas tre probable, ke pro tio la ideo pri komuna lingvo neniam aperis flanke de politikistoj partoprenantaj en la organizado de la eŭropa integriĝo. La Mastriĥtan (kaj la postajn) Traktato(j)n, kiu(j) estis preparita(j) fare de interregistara(j) konferenco(j), fine aprobis kaj subskribis la Eŭropa Konsilio, kiu konsistas el la registarestroj kaj ŝtatestroj de la membroŝtatoj. Por ili neniam povis esti temo la ideo pri komuna lingvo pro la supre diritaj. El la egalrajteco sekvis por ili la multlingveco, egalrajta uzo de ĉiu oficiala lingvo por oficiala komunikado, eĉ se ĝi estas multtekosta. Por la civitana internacia komunikado la Konsilio proponis, ke la civitanoj alproprigu du-tri fremdajn lingvojn.

Alia afero estas, ke en la ĉiutaga vivo pli kaj pli aperas la bezono je eŭropa komuna lingvo kaj por tia celo oni uzas la anglan ne zorganta pri la sekvaĵoj, eĉ neglektanta ilin.

La taskoj kontroli la respekton de la Traktato kaj organizi la plenumon de la konsiliaj decidoj apartenas al la Eŭropa Komisiono. En ĉi tiu agosfero ĝi (kaj nur ĝi) rajtas iniciati leĝon kaj kadroleĝon. Ĉar la lingvo kaj kulturo estas en membroŝtata agosfero, en lingva afero la Komisiono iniciatan rajton havas nur koncerne la lingvouzon ĉe la EU-institucioj.

Estas jam klare, kial estis daŭre rifuzitaj la esperantistaj iniciatoj, demandoj k.s. fare EU-institucioj. Bedürinde la esperantistaj agantoj ne ekzamenis aŭ neglektis la kaŭzojn de la rifuzoj. Kvankam EU-politikistoj plurfoje memorigis ilin pri la reguloj de la Eŭropa Unio. Ekzemple:

„Marianne Thyssen (Nederlando) opiniis: *oficiala ŝanĝo en la lingvouzo eblus nur post unuanima konsento de la Konsilio de Ministroj, sed oni ne sentos bezonon reformi la nunan lingvan reĝimon...*” (1993) (Emfazite de L. G.)

En decembro 1999 irlanda EP-ano sendis skriban demandon al Romano Prodi, prezidanto de la Komisiono. Li demandis ĉu la Komisiono konsiderus la enkondukon de Esperanto kiel plia laborlingvo en Eŭropa Unio? – La respondo de Prodi alvenis en januaro 2000. Li respondis, ke *la artikolo 290 de la Traktato de la Eŭropa Komunumo fiksas, ke lingva politiko ne estas agadsfero de la Komisiono sed tiu de la Konsilio.* (2000) (Emfazite de L. G.)

Klaran respondon donis Neil Kinnock, vicprezidanto de la Komisiono, al David R. Curtis en 2002:

„Dankon pro via letero de la 29-a de novembro. Mia ministraro kaj la lingvoservoj respondis, je mia peto, al viaj pri fruaj leteroj.

Vi estas, kompreneble, tute rajtigita je via vidpunkto pri la dezirindeco de provizado por Esperanto-instruado en lernejoj tra [la] Eŭropa Unio. Egale vi rajtas daŭrigi vian kampanjon por subteno al la pli vasta uzado de Esperanto.

Dum mi respektas ĉiun el tiuj rajtoj, tamen, mi ne emas subteni viajn klopodojn. Mia vidpunkto ŝuldas nenion al antaŭjuĝo kontraŭ Esperanto. Mi tenas ĝin simple ĉar mi nepovas esti persvadita ke tiu lingvo povus fariĝi lingua franca, eĉ kun la stimulo de vasta inkluzivo en la granda varieco de lernejaj instruprogramoj. Intertempe, kompreneble, [la] Eŭropa Unio – prave – ne havas leĝan povon por specifi studobjekton por instruado en la lernejoj de Membroŝtatoj.

Krom mia persona vidpunkto, mi povas nur konfirmi tion, kio estis dirita al vi antaŭe: la Komisiono devas evidente resti fidela al la Regulo, kiu kondiĉas ke la oficialaj lingvoj de [la] Eŭropa Unio estas la oficialaj lingvoj de la Membroŝtatoj. Tiu leĝa devigo, kune kun la praktikaj postuloj leviĝantaj el provizado de lingvoj servoj en 11 lingvoj nun, kaj 21 lingvoj ekde 2004, daŭros certigi ke ni ne serĉos evoluigi kapacitojn en Esperanto.

Mi konstatas ke ĉi tiu respondo eble malkontentigos vin sed mi pensas ke estas pli bone respondi al vi malkaŝe kaj konkluzive ol kuraĝigi falsajn esperojn.” (Esperantigis David R. Curtis)

Sen pluaj citaĵoj oni povas konstati, ke la respondoj de la instituciaj funkciuloj aludis al priskriboj de la Traktato.

Eblaj estontaj ĉefdirektoj de la lingvopolitiko en la Eŭropa Unio – laŭ profesoro Grin

Traktante la ŝancon de Esperanto en la Eŭropa Unio oni devas tuŝi la raporton de la svisa universitata profesoro François Grin. (Grin, François: *L'enseignement des langues étrangères comme politique publique. RAPPORT ÉTABLI À LA DEMANDE DU HAUT CONSEIL DE L'ÉVALUATION DE L'ÉCOLE.*

<http://enotero.free.fr/rapportgrin.doc/> Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko. Raporto verkita je la peto de la Alta Konsilio pri Taksado de la

Instrusistemo. (Sintezo kaj rekomendoj).

<http://www.uea.org/vikio/GRIN00sintezo>)

Lia raporto aperis en septembro 2005. Jen partoj el la ĉapitro Sintezo kaj rekomendoj:

„Tri scenaroj estos analizitaj: la « tutangla » (scenaro 1); la « plurlingvisma » (scenaro 2); kaj « Esperanto » (scenaro 3). Tiuj tri scenaroj kompreneble povus esti la celo de pli detala analizo, kaj esti kombinitaj kadre de strategia ekstraktado de la lingva politiko. La emfazo ne troviĝas sur la konsekvencoj de la efektivigo de tiuj scenaroj, sed sur ilia komparo laŭ efikeco kaj egalrajteco. Konsiderante la novecon de la analizo-kadro kaj la manko de taŭgaj informoj, la taksado povas esti nur proksimuma kaj nur celas disponigi skalojn de grandeco; laŭ mia opinio, tio tamen estas la unua fojo kiam oni provas kalkuli la netajn transpagojn kiujn la anglalingvaj landoj profitas pro la supero de la angla, kompare al la ŝparoj pro la elekto de alia scenaro. Memkompreneble, ne la angla lingvo mem kulpas, sed la lingva hegemonio, kiu ajn lando aŭ grupo de landoj profitas ĝin. La ĉefaj rezultoj de la komparo inter tiuj scenaroj jenas:

- 1) Britio enspezas nete almenaŭ 10 miliardojn da eŭroj jare, pro la nuna domino de la angla;
- 2) se oni konsideras la multobligan efikon de certaj komponantoj de tiu sumo, kaj la rendimenton de la kapitalo kiun la anglalingvaj landoj povas investi aliloke, pro la privilegia pozicio de sia lingvo, tiu sumo atingas 17 ĝis 18 miliardojn da eŭroj jare;
- 3) tiu sumo sendube estus pli alta, se la hegemonio de tiu lingvo plifortiĝus pro la prioritato kiun aliaj ŝtatoj konsentus doni ĝin, interalie en la kadro de iliaj respektivaj edukpolitikoj.
- 4) tiu sumo ne enkalkulas la diversajn simbolajn efikojn (kiel la avantaĝo kiun ĝuas la denaskaj parolantoj de hegemonia lingvo dum ajna situacio de intertraktado aŭ konflikto okazanta en ilia lingvo); verdire, tiuj simbolaj efikoj eble havas ankaŭ materialajn kaj financajn konsekvencojn.
- 5) la «plurlingvisma» scenaro (kiu, praktike, povas alpreni tre malsimilajn formojn, inter kiuj unu estas analizita ĉi tie) ne malpliigas la kostojn, sed la malekvilibro inter lingvouzantoj; tamen, konsiderinte la rolantajn fortojn pri la lingva dinamiko, ĝi prezentas iun riskon de malstabileco, kaj postulas tutan aron da akompanantaj aranĝoj por esti eltenebla.
- 6) la scenaro « Esperanto » montriĝas la plej avantaĝa, ĉar ĝi konvertiĝas al neta ŝparo, por Francio, de almenaŭ 5,4 miliardojn da eŭroj jare, kaj nete, por la tuta EU (inkluzive Britio kaj Irlando), de ĉirkaŭ 25 miliardoj da eŭroj jare.

La oftaj rifuzreagoj kontraŭ esperanto malebligas la scenaron 3 ene de mallonga templimo. Aliflanke, oni povas rekomendi ĝin, en la kadro de longdaŭra strategio, kiun oni povas efektiviĝi ene de unu generacio. Du kondiĉoj tamen nepras por ĝia sukceso: unue grandega informkampanjo, por venki la antaŭjuĝojn pri tiu lingvo — kaj kiuj ĝenerale baziĝas sur simpla ignoro — kaj helpi la evoluon de la pensmaniero; due, vera interŝtata kunordigado por la komuna efektivigo de tia scenaro. Okdek kvin

procentoj de la loĝantaro de la EU-25 akiras tujan kaj evidentan profiton el tio, eĉ sen konsideri la riskojn politikajn kaj kulturajn kaŭzitajn pro lingva hegemonio.

En mallonga aŭ meze longa templimo, la scenaro 2, t.e. tiu de « plurlingvismo » estas preferinda, nur ĉar ĝi ĝuas pli grandan politikan akcepton. Se ĝi ne estas malpli kosta, koncerne rektajn kostojn, ol la nuna solvo aŭ ol tiu de la scenaro 1 (« ĉio nur angle »), ĝi konsiderinde malaltigas la maljustajn transpagojn kiuj estas konsekvenco de la 1-a scenaro. Aldone, tio eble estas la scenaro kiu akordiĝas al la ideo de EU konstruita sur la diverseco de lingvoj kaj kulturoj, kion oni ofte aŭdas en la paroloj de komunumaj oficialuloj. Tiu 2-a scenaro tamen entenas riskojn malstabiligi kaj erodi favore al la angla, kio donas argumenton favore al la 3-a scenaro. Tamen, se la akompano-dispozicioj povas daŭre garantii plurlingvismon, la dua scenaro povas esti longtempa strategio.”

Tute ne estas seninteresa la fakto, ke kvankam la raporto estis petita fare de la franca Alta Konsilio pri Taksado de la Instrusistemo, sed de tiu la informojn petis franca ministro respondanta ankaŭ pri la publika instruado. (Ili elektis la plurlingvecon.) Dum la ĝis nun traktitaj faktoj, nome la reguloj de la Eŭropa Unio montras plenan senŝancecon por Esperanto, la raporto de profesoro Grin konfirmas nin pri la ebla favora socia rolo de Esperanto en la Eŭropa Unio (eĉ en la tuta Eŭropo), sed la realigo de tiu rolo efektiviĝus nur tiukaze, se plenumiĝus du treege gravaj kondiĉoj: „unue grandega informkampanjo, por venki la antaŭjuĝojn pri tiu lingvo”, „due, vera interŝtata kunordigado por la komuna efektivigo de tia scenaro”. Estas evidente, ke la dua kondiĉo ne povus okazi, se la unua ne plenumiĝus. Kiam oni povus diri, ke la unua kondiĉo estas kvazaŭ plenumita? Tiukaze, se la plimulto de la eŭropa loĝantaro fakte estus simpatianto de Esperanto. Konsidere movadhistoriajn spertojn kaj atingajojn oni apenaŭ povas esperi, ke ene de antaŭvidebla tempo tiu celo estus akirebla. Sed la eŭropa esperanto-movado pliriĝigante siajn agadmetodojn havas ŝancojn akiri multe pli bonajn rezultojn kompare al la ĝisnunaj.

Pri la celoj, motivoj kaj mankoj de la eŭropa plurlingveco

La mult- kaj plurlingveco estas temo de multaj dokumentoj, programoj, agadplanoj k.s. de la institucioj de la Eŭropa Unio. Ĉi tiu fakto per si mem montras la gravecon, kiun tiuj institucioj kaj plejparte ankaŭ la membroŝtataj registaroj atribuas al la mult- kaj plurlingveco. (Estas rimarkinde, ke la instituciaj dokumentoj ofte uzas por ambaŭ kazo la vorton ‘multlingveco’.)

Por firmigi sian ideon pri la mult- kaj plurlingveco la Eŭropa Komisiono plurfoje petis rekomendojn de laborgrupoj konsistantaj el eminentaj fakuloj.

La plurlingveco, do la ideo kaj rekomendo, ke ĉiu civitano scipovu uzi almenaŭ du fremdajn lingvojn, ĉefe celas ne la disvolvon de la ĝenerala eŭropa komunikado, sed antaŭenigi interkulturajn rilatojn, krome evoluigi individuajn kabaplojn de la civitanoj. (Nature, la scio de fremda lingvo ebligas la komunikadon, nur demando, ke en kia vasta internacia rondo.)

En la komisiona dokumento „Nova kadrostrategio por stimuli la multlingvecon”, kiun la Komisiono sendis al la Konsilio, Eŭropa Parlamento, Ekonomia kaj Sociala Komitato kaj Komitato de Regionoj oni povas legi pri la plurlingveco:

„Tiu kapablo, dezirindas por ĉiu eŭropa civitano, nemalhavebla lerteco por la prospero en la ĉiutaga vivo, ke oni komprenu plurajn lingvojn kaj scipovu komuniki – ĉi tio estas ĉiutaga realo por la plej multaj popoloj en la Tero. Tio stimulas nin, ke ni iĝu pli malferma al la kulturo kaj pensmaniero⁵, ĝi disvolvas la kapablojn, kaj plibonigas la gepatralingvajn kapablojn de la lernantoj; ĝi ebligas por la homoj, ke ili eluzu la liberan eblon por la dungiteco kaj lernado.

En marto 2002 la ŝtat- kaj registarestroj de la Eŭropa Unio kunsidante en Barcelono celis la lernadon ekde frua aĝo de almenaŭ du fremdaj lingvoj.”

La piednoto 5 diras: „Bazo de la kompreno de aliaj kulturoj estas la lernado de tiuj lingvoj, kiuj esprimas tiujn kulturojn, pro tio la Komisiono ne apogas uzon de artefaritaj lingvoj, ĉar ili, sekve de ilia esenco, ne havas kulturalan fonon.”

[COM(2005) 596; COMMUNICATION FROM THE KOMMISSION TO THE COUNCIL, THE EUROPEAN ECONOMIC AND SOCIAL COMMITTEE AND THE COMMITTEE OF THE REGIONS A New Framework Strategy for Multilingualism;

<http://eur-lex.europa.eu/LexUriServ/LexUriServ.do?uri=COM:2005:0596:FIN:en:PDF>]

Esperantistoj, kompreneble, multe kritikis la aserton de la piednoto.

Jam ankaŭ la cititaj fragmentoj montras, ke konsidere la lernadon de fremdaj lingvoj la baza celo estas ne vaste praktikebla komunikado en Eŭropo, sed ekkono de alia kulturo apartenanta al la lernata lingvo. El la komisiona argumento, se ĝi estus vera, devus sekvi, ke la ekkono de la kulturo de iu ajn popolo estas ligita al alproprigo de ties lingvo. Alivorte, iu povus ekkoni nur tiujn kulturojn kies lingvojn li alproprigis.

Alia labordokumentoj de la Komisiono (nome: Raporto pri la plenumo de agadplano por la stimulo de la lingvolernado kaj la lingva diverseco) diras:

„La lingvoj estas bazpilieroj de la eŭropa ideo: respegulas la diversajn kulturojn, samtempe, ili estas ŝlosiloj por la kompreno de tiuj kulturoj. Estas unusence, ke ankaŭ la Eŭropa Komisiono havas konkretan rolon en la stimulado de la plurlingveco, apogante kaj kompletigante la laboron de la membroŝtatoj: tiuj eŭropaj civitanoj, kiuj parolas plurajn lingvojn, tiuj kapablas eluzi ĉiun avantaĝon de la libera movo en la Eŭropa Unio, kaj la lingvoscio de ili plifaciligas ilian akomodiĝon okaze de fremdlanda lernado aŭ laboro. Ankaŭ la laborejoj alte aprezas la lingvan kompetentecon: la scio de fremdaj lingvoj favore influas la dungiteceblon. La lingvoj estas unuarangaj iloj de la komunikado: kono de pluraj lingvoj malfermas pordojn de novaj kulturoj, kaj helpas la komprenon inter la kulturoj, kaj interne Eŭropo kaj en aliaj partoj de la mondo.”

La raporto, kiu detale priskribas la atingiĝojn, mallonge skizas ankaŭ la situacion rilate la elektelecon de la lingvoj.

„Oni petis la membroŝtatojn, ke ili certigu la plej vastan lingvoelektelecon. La sortimento de la lingvoj malegalas. Unuflanke en kelkaj membroŝtatoj

tre limigita estas la nombro de la lerneblaj lingvoj (unuavice la angla, respektive en la laŭlimaj regionoj aŭ en migrintaj komunumoj povas esti alia lingvo en speciala instruplano). Aliflanke en tiuj membroŝtatoj, kie oni povas elekti el vasta sortimento de la lingvoj, laŭ la spertoj la multlingvecon oni malfacile povas realigi en la lernejoj. La familioj ofte ne scias, ke kiajn avantaĝojn donas, se iu lernas ne nur unu fremdan lingvon.”

„La eŭropaj programoj funkciantaj en kampoj de la instruado, kulturo, junularo kaj civila socio, specife la programo de la dumviva lernado, estas gravaj rimedoj, kiuj kompletigas la naciajn fakpolitikojn, kaj donas eŭropan karakteron al la lernaj agadoj.”

[COM(2007)554 F/2; COMMISSION WORKING DOCUMENT Report on the implementation of the „Promoting language learning and linguistic diversity”;

<http://eur-lex.europa.eu/LexUriServ/LexUriServ.do?uri=COM:2007:0554:FIN:en:PDF>]

Pri la plurlingveco okupis sin ankaŭ altnivela laborgrupo, kaj prezentis sian ferman raporton al la Komisiono. Jen kelkaj konstatoj el ĝia mallongigita raporto.

„(...) la Komisiono, el la vidpunkto de la eŭropa plano, pli kaj pli rekonas la kreskantan signifon de la defio montriĝanta en la multlingveco. Pro la sekvoj de la plivastigo, la unueca merkato kaj la pli intensaj movoj ene de la Eŭropa Unio, la revigliĝo de regionoj, la apero de la sciobaza socio, la enmigrado en la Eŭropan Union kaj la tutmondiĝo – la plurlingveco alvenis al nova ĉapitro, el la vidpunkto de la gradeco, komplekseco kaj politika graveco. Tio plej klare estas videbla en la komunikado inter la lingvoj kaj kulturoj. Kvankam pli frue tiu ĉi demando tuŝis unuavice la interpersonajn rilatojn inter civitanoj de diversaj membroŝtatoj, ĝis nun praktike ĉiu membroŝtato de EU iĝis plurlingva kaj multkultura socio, kio bezonas tiajn lokajn/regionajn/membroŝtatajn strategiojn, kiuj helpas la komunikadon tra lingvaj kaj kulturaj limoj. Nuntempe ne malpli ol 450 diversajn lingvojn oni parolas kaj uzas en la tereno de la membroŝtatoj.”

La laborgrupo emfazis ankaŭ la favoran efikon de la lingvolernado por la kapabloj de lernantoj.

„La lingvolernado bone efikas sur la atento, kompreno, kapablo, memoro, koncentriĝo, penskapablo, kritika pensado, problemsolvo kaj kapablo je gruplaboro. Ĉi tiuj individuaj avantaĝoj estas plue tre gravaj en la bonstato por ĉiu nivelo de la socio.”

„La lingvoj havas interkulturan valoron. Krom la stimulo je malfermeteco al la kulturo kaj sinteno de aliaj popoloj, la lingvoinstruado povas konsciigi por ni niajn proprajn kulturon kaj valorojn, respektive povas stimuli nian intencon kaj povas fortigi nian kapablon por la komunikado kaj kunlaboro kun aliaj popoloj tra kulturaj limoj.”

[High Level Group on multilingualism FINAL REPORT;

http://ec.europa.eu/education/languages/archive/doc/multishort_en.pdf]

Alia grupo de eminentuloj sian raporton (Honoriga tasko. Kiel la lingva diverseco povas fortigi Eŭropon) enkondukis per gravaj demandoj. La raporto enhavas ankaŭ interesan – sed laŭ mi iluzian – rekomendon pri la dua gepatra lingvo.

„La lingva diverseco signifas defion por Eŭropo. (...) Por tio, ke ni povu efike trakti ĉi tiun diversecon la Eŭropa Unio devas ekzameni tiajn demandojn, kiuj en nia nuna mondo iĝis ungrade gravaj, kaj kiuj estas eviteblaj nur se oni riskas la estontecon: Kiel estas akireble, ke la diversaj popoloj kunvivu harmonie? Kiel oni povas komprenigi al ili la komunan sorton kaj la kunapartenecon? Ĉu oni devas difini la eŭropan identecon? Ĉu ĝi povas kunordigi la tutan diversecon? Ĉu tiu ĉi identeco povas alpreni ankaŭ elementojn devenajn ne el Eŭropo? Ĉu la estimo de diversaj kulturoj estas kunordigeblaj kun la estimo de la bazaj valoroj?”

„Se la plej multaj eŭropaj nacioj konstruis sin sur la bazo de sia lingva identeco, la Eŭropa Unio povas konstruiĝi nur sur sia lingva diverseco. Kiu, laŭ ni, estas precipe grava solidareca forto. Tio, ke la solidareca travivaĵo baziĝas sur la lingva kaj kultura diversecoj, estas eksterordinara kontraŭrimedo kontraŭ la fanatismo, al kiu ne malmulte deturniĝis la eŭropaj identecmanifestoj antaŭlonge kaj nuntempe.”

„(...) estas granda la tento, ke estiĝu tiu situacio, en kiu unu lingvo – la angla – iĝus superrega kiel laborlingvo en eŭropaj institucioj, kie du-tri aliaj lingvoj povus resti ĝis iom da tempo, en iom post iom malboniĝanta situacio, dum por la plejparto de niaj lingvoj restus nur la simbola rolo, kaj preskaŭ neniam uzus ni ilin en komunaj kunvenoj.

Por ni ne estas dezirinda tia ŝanĝo. Tiu estus damaĝa el la vidpunktoj de la ekonomia kaj strategia interesoj de la kontinento, kaj de la interesoj de civitanoj, sen la konsidero al iliaj gepatra lingvo. Tio estus kontraŭ la spirito de la eŭropa plano, ankaŭ el pluraj vidpunktoj.”

„(...) la Eŭropa Unio devus popularigi la koncepton de la *dua gepatra lingvo*. Tiu koncepto signifas laŭ ni, ke ĉiu eŭropano povus libere elekti unu lingvon, kiu ne estas sia nacia lingvo, sed ankaŭ ne tiu, kiun li uzas en la internacia komunikado. Laŭ nia imago, la dua gepatra lingvo estus ne alia dua fremda lingvo, sed plie ĝi signifus rilaton, similan al la gepatra lingvo, al la konscie lernata lingvo.”

[A REWARDING CHALLENGE;

http://ec.europa.eu/education/languages/archive/doc/maalouf/report_en.pdf]

Kiu detale studas almenaŭ la supre menciitajn dokumentojn, tiu nepre rimarkas, ke la plurlingveco nur duavice signifas komunikan aferon, unuavice ĝi servas politikan celon de EU-institucioj, ĉefe por la Komisiono. Laŭ la baza leĝo, la Eŭropa Unio estimas la kulturon de la membroŝtatoj. Sed estas demando, ke praktike en kio manifestiĝas tiu estimo. Tio estas grava demando kiam la civitana konfido al la Eŭropa Unio ankoraŭ (aŭ jam) ne estas tre forta. Krome oni povas sperti, ke inter la diverslandaj loĝantaroj estas senfido. Ŝajnas, ke la EU-institucioj uzas la plurlingvecon por esprimi siajn estimon al la membroŝtataj kulturoj, kaj uzas ĝin ankaŭ antaŭenigi la interproksimiĝon de la eŭropaj popoloj. Tio estas memkomprenebla afero, ja la lingvo estas la plej videbla parto de la kulturo.

La dokumentoj tion sugestas, ke la plurlingveco estas solvo ankaŭ por la eŭropa komunikado. Estas klare, ke la plurlingveco ne donas la vastan, ĝeneralan solvon de la eŭropaj komunikadaj bezonoj. Pri tio spiritan ekzemplon diris la belga André Martin la 17-an de oktobro 1995, okaze de publika aŭskultado en la Eŭropa Parlamento por pretigi la interregistaran konferencon okazonta en 1996.

„Pri la neceso de la dialogo inter la Eŭropanoj mem – alia problemo por solvi se oni volas iam konstruadi ian Union estantan ankaŭ tiu de siaj civitanoj – kion ĝis nun oficiale oni proponis al ni? Nur la fare de ĉiu lernadon de du aŭ tri lingvoj krom la propra, spite la elpruvitajn limojn de la lerneja instruado al la dua kaj tria lingvo laŭlonge de pluraj generacioj. Formulo cetere des pli lama, ke oni malfacile imagas al si, kiel ekzemple genieca Svedo, eĉ ĝisfunde scipovanta la anglan, la germanan kaj la nederlandan, se ne ankaŭ la polan aŭ la finnan, iam povus vivi indan interparoladon kun ne malpi superdotita Greko flue uzanta la italan, la hispanan kaj la francan, se ne eĉ la serbo-kroatan plie!”

Kvankam la EU-institucioj tute konscias pri la pli granda plivastigo de la angla, ilia reago estas la silenta konsento, kaj la Komisiono maksimume diras, ke „la angla ne estas sufiĉa”. Tion oni povas interpreti, ke la angla nepre devas, sed oni devas lerni ankaŭ aliajn lingvojn pro la postulo de la plurlingveco. Cetere estas konata fakto la reciproka influo favore al la angla inter la EU- kaj ŝtataj instancoj kaj la gepatroj.

Kvankam la agosfero pri instruado estas membroŝtata, la Komisiono havas rajton kaj sufiĉe da rimedoj por influi kaj subvencii la lingvolernadon, ne nur la lernejan, sed ankaŭ ekster la lernejoj kadre de la programo pri la dumviva lernado.

Kelkaj konkludoj

Postuli ĉe la institucioj de la Eŭropa Unio la oficialigon de Esperanto tute ne havas sencon, ĉar tiu postulo kontraŭdiras al la baza leĝo de EU, do nepre rifuzas ĝin. Por la ŝanĝigo de tiu leĝo tute mankas la amasa subteno de la eŭropa loĝantaro.

La lingvopolitiko de la Eŭropa Unio esprimiĝas en la mult- kaj plurlingveco. La apliko de la multlingveco ne malofte estas manka en la praktiko, kio malobservas bazan principon, do ĝi estas prirespondigebla. La principo de la plurlingveco ne donas plenan kaj taŭgan solvon por la eŭropa komunikado; en la praktiko ĝi nur tre malrapide plenumiĝas pro la sinteno de registaroj kaj tiu de la loĝantaro, kiuj plejparte favoras nur la anglan. La ideo de plurlingveco estas eŭropcentra.

La fakta lingvosituacio en la Eŭropa Unio kaŝas en si plurajn eblojn por plivastigi la poresperantan agadon. Por eluzi tiajn eblojn la agantoj povus esti pli malfermaj kaj emaj kunlabori kun ne esperantistaj organizoj.

La esenco de la laŭcela poresparanta strategio povas esti la informado al la plej diversaj sociaj tavoloj, la malkovro de agadebloj kaj „blankaj makuloj”; plue la konformiĝo en la ĉiutaga agado de la socia medio. Temas pri tio, ekzemple, ke en la programoj de la Eŭropa Komisiono, konsidere la plurlingvecon, ofte estas tiaj partoj, al kiuj oni povus aliĝi. (Tiaj ekzemploj jam estas konataj.) Ankaŭ Esperanto estas rimedo, ne nur la plurlingveco, konigi kulturojn, interproksimigi

popolojn. Sed pri tio ne sufiĉas nur paroli, sed oni prezentu tiun taŭgecon en la praktiko. Aŭ ankaŭ Esperanton oni povas proponi lerni kadre de la dumviva lernado. Ktp.

En la jaro 2011 ricevos apogon la Danubo-regiona Strategio de EU, kiu celas, inter ceteraj, la interproksimiĝon de la popoloj en tiu areo. Ĉu Esperanto-organizoj ne trovas taskojn en ĝi? Antaŭa informo pri la Danubo-regiona Strategio de EU:

http://www.vilagnyelv.tripod.com/Form_DS.htm

Funkcias sufiĉe da diversaj civilaj organizoj. Certe ekzistas tiajn, kies celoj iomete estas proksime al tiuj de esperantistoj. Kadre de interrilatoj ili povus okazigi foje-foje komunan kunvenon por reciproke informi pri siaj celoj kaj agadoj. Ĉu tio ne estus evidenta rimedo por informi pri Esperanto?

La lingvouzo, kiu sekvas el la lingvopolitiko de EU, sendube kaŭzas kazojn, kiuj malobservas bazajn principojn pri la egaleco, homa digno k.s. Esperantistoj devus malkovri la eblojn por protesti pro konkretaj kazoj.

Ĉi tiuj konkludaj pensoj, kiuj baziĝas ankaŭ sur personaj spertoj, celis nur stimulon por plupensi la nunan staton kaj la eblajn farenadojn.

Resumo

Tiu ĉi artikolo prezentis al vi grandlinie la eventojn de la t.n. eŭropa agado por oficiale akceptigi Esperanton ĉe la institucioj de la Eŭropa Unio. La imago de la t.n. brusela laborgrupo pri la farenadoj estis tre ambicia sed ne reala. Ili unufanke mise interpretis la eblojn de la EU-institucioj, aliflanke ili ne havis sufiĉan laborforton por la plenumo. La fervora aktivado jam dekomence kunportis la malsukceson. La malsukceso unuavice devenis el tio, ke la reguloj de la baza leĝo de la Eŭropa Unio ekskludas la oficialan akcepton de komuna lingvo. Kvankam Esperanto estus tre avantaĝa por Eŭropo laŭ la raporto François Grin, tamen, por ĝia vasta uzo oni devus plenumi gravajn kondiĉojn. Por plenumi tiujn kondiĉojn taŭga forto ne montriĝas. La lingvopolitiko de EU esprimiĝas en la mult- kaj plurlingveca tendenco, kiu ricevas tre fortan kaj gravan subtenon de la uniaj institucioj, unuavice de la Komisiono.

Pro la skizita stato poresperantaj agontoj devus studi la nunan staton en la Eŭropa Unio kaj pripensi la konvenan agadstrategion.

Budapeŝto, la 11-an de septembro 2010.

László Gados

Diskutopinioj

pri la ronda tabla referaĵo de László Gados:

Kial la Eŭropa Unio ne povas oficiale havi komunan lingvon?

Zlatko Tišljarić: „La vidpunktojn de Gados mi absolute subtenas. Estas substrenkinda tia konstato pri neceso instigi kaj kunpartoprenigi la interŝtatan kunordigadon. Akcepti subsidiarecan principon, ĉar nur ŝtatoj kadre de siaj diskutoj pri la problemoj povus atingi certajn konkludojn kaj tiam postuli de EU

fari ion. Oni devus konsideri ke la popoloj de EU absolute nenion scias pri Esperanto kaj do ne ekzistas ia postulo al la politikistoj fari ion. [...].”

Michel Duc Goninaz: „Sinjoro Gados parolis pri la fiasko de la ĝisnunaj klopodoj ĉe EU. Estas strange, ke oni nun konstatas fiaskon, kiu estis antaŭvidebla ekde la komenco, same kiel estis antaŭvideblaj la fiaskoj de ĉiuj oportunismaj klopodoj de la Esperanto-movado adaptiĝi al iu reĝimo aŭ iu ŝtato, por konvinki la tieajn politikistojn ke ili devas favori Esperanton. Kvankam ĝi ne estas rekte temo de nia Ronda Tablo, ni tamen diru, ke se oni iom analizus tiun situacion – la historion de pli ol jarcento de tiuj senĉesaj fiaskoj –, oni eble trovus kialojn. Sed ŝajnas al ni, ke la Esperanto-movado ĝenerale ne volas tion vidi kaj eĉ ne volas analizi tiun situacion.”

Senad Čolić: „La kontribuaĵo de s-ro Gados estas vere instruplena ne nur por la nuna, sed por novaj generacioj de la Esperanto-movado. La Esperanto-movado kutime ne komprenas politikon, ĝi ludas ian ‘tradician neŭtralecon’, kaj sekve 99,9% da membroj, adeptoj vere ne komprenas la aferon. Politiko estas tre specifa homagado. Ĝi regas la socion kaj niajn vivojn. La regado de socio estas aparta metio. Ĝin oni lernis ekde la unua tria komunumo ĝis la nuntempo, tra generacioj. [...]

La ĝisnuna nia tuta historio ne elnestis niajn politikajn gvidantojn. Eĉ se kelkaj fariĝis esperantistoj, post kiam ili eniris la ĝangalon de politika agado ili forlasis la Movadon. Tial kontribuaĵo de Gados valoras diskonigon. Ĝi mesaĝas ke ni ne okupiĝu pri la aferoj se ni ne konas la temon. Se ni estas ekster la temo, neniu povas normale nin akcepti, ĉar neniu komprenas pri kio ni parolas. Tial mi pledas ke la aktuala strategio de la Movado devas esti direktita al t.n. pragmatismo. Ni havas nian instrumenton, ni havas nian Movadon, nun ni havas Eŭropon sen landlimoj. Estas multaj eblecoj por larĝa agado pri kio sopiris multaj lastaj generacioj precipe en Orienta Eŭropo. Per EU estas al ni malfermitaj pordoj de la mondo. Ni devas per praktikaj diversaj agadoj vivisigni, montri ke la afero funkcias. Tio estas ankaŭ la ĉefa funkcio de UEA. [...].”

Citaĵoj el la libro: *Eŭropa Unio hieraŭ hodiaŭ morgaŭ. Lingvaj kaj kulturaj aspektoj. Referaĵoj kaj diskutintervenoj*. Sarajevo, elbih 2011. Redaktis Senad Čolić.